

Atentigas la kuba prezidento pri morteco de la Covid-19 en la centra provinco Ciego de Ávila



Kuba prezidento Miguel Díaz-Canel en kunsido pri la Covid-19

Havano, sep 23 (RHK) La ĉiutaga kunsido de la provizora laborgrupo de la registaro, prezidita de la ĉefministro Miguel Díaz-Canel kaj la ĉefministro Manuel Marrero, dediĝis sian analizon al la situacio de Havano, Ciego de Ávila, Matanzas, Sancti Spiritus kaj Holguin, la kvin provincoj, kiuj konfirmis

novajn kazojn de Covid-19 ĉi marde.

La ĉefministro denove atentigis pri la morteco ekzistanta nun en la centra provinco Ciego de Ávila, teritorio kun la plej alta indikilo rilate pozitivajn kazojn por ĉiu cent mil loĝantoj dum la lastaj 15 tagoj, kaj krome, dum la lastaj tagoj, havis pli da mortintojn, kio delonge ne okazis en la insulo.

Aliflanke, la guberniestro de Havano, Reynaldo García Zapata informis pri la situacio de la ?efurbo, kiu fermis du eventojn de loka transmisio.

La vicministrino pri publika sano, Regla Angulo, elstarigis la laboron faritan en Havano por solvi la kazojn sen epidemiologiajn ligojn, kiuj en difinita momento atingis la nombron de 55.

Aparta atento estis donita al nova evento malfermita en la okcidenta provinco Matanzas, en la konstrua centro de turismo, kiu estigis ?is nun 57 novajn kazojn. Oni pristudas pli ol 2200 personojn per la koncernaj testoj dum efektivigas la procezo por identigi iliajn kontaktojn kaj izoligi ilin en la centroj pretaj por tiuj kazoj.

En tiu ?i laborsesio anka? partoprenis la guberniestroj de Artemisa kaj Sancti Spiritus, provincoj kun po 33 kazoj dum la lastaj 15 tagoj, samkiel la guberniestro de la orienta provinco Holguin, kun 4 pozitivaj samperiode, malsamaj realoj, kiuj ser?as saman celon, tio estas, bremsi la konta?on por eviti kontrolperdon de la situacio, indiko ofte petita de la kuba registaro.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/234899-atentigas-la-kuba-prezidento-pri-morteco-de-la-covid-19-en-la-centra-provinco-ciego-de-avila>



Radio Habana Cuba